# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)
TTT-ejo:

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com

**Jar-kotizoj**: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**MARTO/APRILO 2011** **Nro. 87 (2/11)**

## ASAMBLEA GENERAL ANUAL.

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 20 de mayo**, **a las 19,30 h.**, en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º dcha., con el siguiente

**Orden del día**:
1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior.
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos correspondiente al año 2010.
3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2011.
4. Informaciones varias.
5. Ruegos y preguntas.

---

## ĜENERALA JARKUNVENO.

Tiel kiel vi povas legi ĉi-supre, la **vendredon 20-an de majo** oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon. Ni ne bezonas substreki ke la partopreno de vi ĉiuj en la decidotaj aferoj, kiuj tuŝas nian Grupon, estas ege grava.

## COMIDA DE ANIVERSARIO DEL GRUPO.

El **sábado 21 de Mayo** celebraremos la ya tradicional comida para festejar el aniversario de la creación del Grupo (el 20 de Mayo hará 105 años). Estáis todos invitados, aunque deberéis **llamar, con antelación**, a cualquiera de los teléfonos que tenéis en la cabecera de esta circular.


El precio será barato y, aunque todavía no hemos elegido sitio, ha sido costumbre acudir a Las Arenas. Familiares, amigos y simpatizantes también son bienvenidos.

**LOKE ...**

## Kvar paĝoj pri Esperanto en “El Correo”.


EL CORREO ESPAÑOL-EL PUEBLO VASCO. DESDE 1910. www.elcorreo.com
EL CORREO
INTERNET RESUCITA EL ESPERANTO
La más universal de las lenguas vive una segunda juventud gracias a la red P71


La lundon 28-an de marto, la ĉefa ĵurnalo de Bilbao, “El Correo” (“*La kuriero*”), aperigis kvar paĝan artikolon pri Esperanto. Samtempe, ĝi aperis en la diversaj ĵurnaloj de la amaskomunikila grupo “Vocento”, t.e., “El Norte de Castilla” (Valladolid), “Diario Vasco” (San Sebastián), “Las Provincias” (Valencia), “Hoy” (Badajoz), “Sur” (Málaga), ...


Ĉu vi parolas Esperanton?

La ĵurnalisto enkondukas Esperanton per la historio de George Soros, kies originala familnomo, “Schwartz”, devenis en “Soros”, esperanta vorto, kiu signifas “supreniros”; poste, oni vojaĝas al la unuaj jaroj en Hispanio kaj finas kun la hela estonteco kiu malfermiĝas por la lingvo danke al interreto; en dua parto, oni substrekas la utilecon de Esperanto en la nuna vivo per la ekzisto de “Pasporta Servo”, ilustrita kun granda foto de nia madrida amiko Manolo Pancorbo en Hungario, apud paro kiu gastigis lin.


Lunes 28.03.11
EL CORREO

## Soros-Fondaĵo neas monhelpon al nia asocio.


OPEN SOCIETY INSTITUTE
O S I
George Soros
Chairman
Aryeh Neier
President

Kiel anoncite, ni sendis leteron al Soros-Fondaĵo, en Novjorko, por peti monhelpon cele al pago de nova lifto en la konstruaĵo kie situiĝas nia sidejo.

Ili tre ĝentile respondis, sed rifuzis nian peton dirante ke ĝi ne kongruas kun la celoj de la Fondaĵo.

## Cuotas nuevas para el año 2011.

Tal y como se acordó en la última Asamblea General, las cuotas de socio, para el año 2011, han sufrido variación. Serán las siguientes:

| | |
|---|---|
| Cuota normal: | 30,00 euros anuales. |
| Cuota reducida: | 15,00 euros anuales. |
| Cuota familiar: | 45,00 euros anuales. |

El aumento, como ya informamos, se debe a los gastos que deberá afrontar el Grupo por la instalación de un ascensor en el inmueble. Aun no han comenzado las obras pero esperamos que esto ocurra de un momento a otro.

# KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ, ...

## 7-a Iberia Renkontiĝo.

La 7a Iberia Renkontiĝo okazos ĉi-jare en Katalunio la 13an, 14an kaj 15an de majo organizita de Kataluna Esperanto-Asocio kun la subteno kaj kunlaboro de hispanaj kaj portugalaj esperantistoj.

La renkontiĝo okazos en la regiono de Ĝirono. Mojosa ĉenatura gastejo en Sant Andreu Salou gastigos la programon, nutros nin per abunda kaj bongusta manĝo kaj proponos gufujon, trinkejon kaj diskejon. En la ĉefa placo de la apuda urbo Cassà de la Selva okazos nokta koncerto-balo de Kaj Tiel Plu. Dimanĉe ni vizitos Ĝironon kadre de la Tempo de Floroj. Informoj kaj aliĝo: http://esperanto.cat/ir2011/

*(Ferriol Macip i Bonet. 31/01/2011)*

## 19-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo

Loko: MALGRAT DE MAR (BARCELONA) HISPANUJO
ADRESO: Hotelo. "Cartago Nova***" str. Passeig Maritimo 92
Dato: de la 1-a, ĝis la 8-a de oktobro 2011.
Koresponda adreso:
Luis Serrano Pérez. Apartado 423. E-08200 SABADELL (Barcelona) Hispanio.
Tel. (+34)93 727.50 21. Rete: luis_serrano@ya.com kaj luis_serrano@mixmail.com
http://personales.ya.com/semajno

## Aliaj kongresoj.

| | |
|---|---|
| 14/21 jul. | 67-a Internacia Junulara Kongreso. Hiblivka (apud Kievo). Ukrainio. |
| 23/30 jul. | 96-a Universala Kongreso de Esperanto. Kopenhago. |
| 30 jul./06 aŭg. | 84-a SAT-Kongreso. Sarajevo. |
| 20/27 aŭg. | Itala Kongreso. Torino. |
| Jul. 2012. | 97-a Universala Kongreso. Hanojo (Vjetnamio) |

## 70-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO.

Daŭras la preparoj por la 70-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en San Lorenzo de El Escorial (Madrido) inter 28-a de junio kaj 2-a de julio 2011. La programo de la Kongreso disvolviĝos laŭ la titolo: "Esperanto 3.0 – E-agado en la 21a jc / Esperanto en el siglo XXI" . La kerno de la programo celos analizi kiamaniere Esperanto adaptiĝos al la novaj uzoj de komunikado kiun la nuna epoko ebligas al parolantoj, kaj montros la manieron en kiu sinsekvaj generacioj de uzantoj kaj agantoj profitas el novaj informkanaloj.

Oni programos praktikajn ekzemplojn, en kiuj oni diskutos kaj utiligos novajn teknologiojn de eldonado kaj de distribuado de filmoj kaj muziko.

Grava estos la turisma flanko, nepra en tiu historia urbo kaj ĉirkaŭo. Estas nun organizataj vizitoj en San Lorenzo de El Escorial, interalie al la fama Eskoriala Monaĥejo, kaj ekskursoj al ĉirkaŭaĵoj. La dimanĉon 3-an de julio, estas programata postkongreso en la ĉefurbo Madrido, dum kiu eblos viziti la urbon mem kaj kelkajn ĝiajn ĉefajn vidindaĵojn.

*("Nia Voĉo", organo de Madrida E-Liceo. Aprilo 2011)*

**H.E.F.**

## La paperoj de Julio Mangada.

Venas la paperoj de Julio Mangada al Hispanio!. Kompreneble, kun pluraj mencioj pri esperantisteco. Mi klopodos informiĝi ĉu la ministerio intencas ion fari.
Vidu ankaŭ:
http://www.meneame.net/story/espana-recupera-papeles-julio-mangada-general-pueblo

*(Toño del Barrio. 10/02/2011)*

## Aliĝo al Civito estas senpaga, sed oni devas pagi por eksiĝi.

En nº3/2011 de "Esperanto Aktuala", monata informilo de Esperantista Brusela Grupo, paĝo 5, oni povas legi artikolon sub la titolo "Angel Arquillos kaj konflikto de Civito en Malago-Andaluzio". Temas pri oficiala letero de Esperanta Civito al Andaluza Esperanto Unio, letero subskribita de Giorgio Silfer *(vera nomo: Valerio Ari, noto de GCF)*, Konsulo.

Parto de la letero temas pri la proceduro por eksiĝi el Civito. La koncerna teksto laùvorte jenas: "Por retiriĝi el la Pakto *(Civito, noto de GCF)* ekzistas proceduro: necesas sendi la koncernan asemblean protokolon, kun subskriboj kaj akompana letero, al la Kortumo *(interna organo de Civito, noto de GCF)*. Tiu proceduro estas praktike la sama plenumita por eniri la Pakton, solaj diferencoj estas la adreso al kiu skribi kaj ke, dum aliĝo estas senpaga, la malaliĝo kostas 640 svisajn frankojn (512,- eùrojn)".

*Aldono: fakta organo de Civito estas la nuna Heroldo de Esperanto, la tiam sendependa gazeto honorofice redaktata dum 34 jaroj de mia edzino Ada Sikorska, Honora Membro de UEA.*
***G. C. Fighiera***

*(Pere de Ferriol Macip y Bonet. 23/02/2011)*

## H.E.F. en Facebook.

Mi komencis krei novan paĝon de Hispana Esperanto-Federacio en Facebook kiu, mi esperas, taŭgos por plia informado kaj atentigo de nia afero en la reto. Ĝi ankaŭ taŭgos por nia ĝenerala informado, ĉar ĉiuj novaĵoj publikigitaj en la paĝaro aŭtomate aldoniĝas al ĝi, pro kio ne necesos plia peno aldone de la bona laboro tiuflanke farita de Dario.

Facebook malfermas plurajn teknikajn eblojn nur al tiuj paĝoj kiuj havas komence pli 25 "fanatikuloj" kaj, poste aldonas kromaj pli interesaj kiam ĝi havas pli ol 100 fanatikuloj. Pro tio mi petas al vi, ke vi fariĝu fanatikulo de nia paĝo, kaj deklaru, ke vi ŝatas ĝin -eĉ se ĝi ankoraŭ estas ne tro altira, kaj eble vi ne ŝatas :) -. Tio vere gravas por ĝia plibonigo kaj utileco.

Vi trovos aliron en la ĉefpaĝoj de la paĝaro de hef, kaj ankaŭ jene:
http://www.facebook.com/pages/Federación-Española-de-Esperanto/198050120222310

*(Miguel A. Sancho. 28/02/2011)*

## Fondaĵo "Esperanto" kaj Navara Ŝparkaso por 2012.

Por informado kaj por klientoj (aŭ por amikoj de klientoj) de CAN:

Fundación Esperanto denove prezentis al ŝparkaso CAN (Caja Navarra) la peton por financa apogo al projekto "Cursos de esperanto". Kaj estas aprobita laŭ la kampanjo "TETD (Tú eliges, tú decides)". Klientoj de tiu ŝparkaso rajtas elekti la destinon de parto de la profitoj de CAN. Ili povas elekti dum 2011 la projektoj realigotaj dum 2012. Kaj inter ili aperas la eblo apogi kursojn de Esperanto:
http://www.cajanavarra.es/es/tus-derechos/tu-eliges-tu-decides/elige-tus-proyectos/buscador/default.htm?origen=tetd&txt=esperanto

*(Lorenzo Noguero, 02/03/2011)*

## ESPERANTA FAKO EN MADRIDA LIBREJO.

La 8-an de aprilo estos malfermata Esperanto-fako en la anarĥiista librejo "La Malatesta" (strato Jesus y Maria, 24 - Madrido) kiun nutros la libroservo de SAT-en-Hispanio. La sekcio komenciĝos je la 19:30, per evento publika, kie anoj de SATeH prelegos pri la rilato inter Esperanto kaj liberecanaj medioj.

*("Nia Voĉo", organo de Madrida E-Liceo. Aprilo 2011)*

## UPyD kaj Esperanto.

De vez en cuando, intento colar, en las entrevistas-chats de los periódicos, preguntas sobre el Esperanto. Esta vez le pregunté al candidato de UPyD Canarias, Manuel de Padro,  la siguiente cuestión: "¿UPyD apuesta por el Esperanto en el sistema educativo?".

Su respuesta fue: "Gracias por la pregunta. No, el esperanto fue un experimento que fracasó. Hoy en día hay que formarse en idiomas, pero en idiomas que te permitan resolver problemas. Si los que hayan estudiado alemán en los últimos diez años hubiesen estudiado esperanto, pocas opciones tendrían de acogerse al plan de empleo de Angela Merkel".

La entrevista completa se puede leer en:
http://comunidad.laopinion.es/entrevista-chat/2259/Politica/manuel-de-prado /entrevista.html

*(Félix G. 28/03/2011)*

## Ronda tablo pri virinoj kaj Esperanto.

Kunmemore al la Internacia Virina Tago, pasintan 12an Marto okazis en la Muzeo de Esperanto de Subirats ronda tablo pri la temo "Virino kaj Esperanto".

Laŭ afabla informo de Joan Inglada, jen ligiloj pri la evento:
http://enesperantujo.blogspot.com/2011/03/virino-kaj-esperanto.html
http://karulo.wordpress.com/2011/03/14/virinaj-esperantistoj-protagonistaj-en-la-muzeo/
http://museuesperanto.org/2011/03/13/les-dones-esperantistes-protagonistes-al-museu/
http://www.esperanto.cat/fotoalbumo/20110312-Virina_Tago_Muzeo_de_Esperanto_de_Subirats/

*(Darío Rodríguez. 15/03/2011)*

## La efemera E-ŝtato "Amikejo".

Legu en http://hoyesarte.com/exposiciones/2/9389-iratxe-jaio-y-klaas-van-gorkum-en-el-musac.html pri ekspozicio en León en kiu aperas rememoro pri la iama efemera esperantista Ŝtato Amikejo (1908-1918)

*(Darío Rodríguez. 08/03/2011)*

## TRA LA MONDO ...

## Amikejo: la Esperanto-lando kiu preskaŭ ekzistis.

Neŭtrala Moresneto estis malgranda kvazaŭregno, ekzistinta nur pro tio ke ĝiaj du grandaj najbarlandoj ambaŭ deziris la areon de ĝia valora zinkominejo. La landeto ekzistis dum pli ol cent jaroj, de 1816 ĝis 1919, sed post la elĉerpiĝo de la zinkominejo en 1885 aperis duboj pri la pretervivo de Neŭtrala Moresneto. Pluraj ideoj estis proponitaj por pli aŭtonomigi ĝin. La plej rimarkinda iniciato venis de D-ro Wilhelm Molly (la mineja kuracisto), inspirita de Gustave Roy, ambaŭ framasonoj: ili celis igi Moresneton la unua Esperanta regno, nomota "Amikejo". La nova regno estis proklamita en aŭgusto 1908, tamen neniu ŝtato, nek la Esperantomovado, prenis la proklamon vere serioze. De post la unua mondmilito Moresneto estas parto de Belgio.

*(Prenita el "Libera Folio")*

## Umberto Eco kaj A.B.Jehoshua en la Esperanto-budo de ELI en la Jerusalema Libro-Foiro.

Dum la 20-25.2 okazis la 25-a Internacia Libro Foiro de Jerusalemo – prestiĝa arnaĝo kiu okazas ĉiun duan jaron en la plej granda kongresa centro de Jerusalemo – Binjane Hauma. Jam la trian fojon sinsekve ELI havas tie budon de Esperanto-libroj kaj revuoj. Pli ol 40 personoj enskribiĝis por la Esperanto-kurso baldaŭ malfermota en Jerusalemo kaj centoj interesiĝis kaj ricevis flugfoliojn pri Esperanto.

En la solena malfermo salutis prezidento Shimon Peres, la ministrino pri edukado Limor Livnat kaj la urbestro de Jerusalemo Nir Barkat. Partoprenis ankaŭ la famaj israelaj verkistoj Meir Shalev kaj David Grosman.

La 23.2 Amri renkontiĝis kun la fama itala verkisto Umberto Eco (kiu verkis i.a. pri Esperanto) kaj donacis al li la novan kompaktdiskon de ELI "Kanti Gefratoj Kune" kaj la lastan n-ron de "Israela Esperantisto". Vizitis nian budon eminentaj gastoj kiel la fama israela verkisto A.B. Jehoshua, kiu ankaŭ ricevis donace la KD-n, Salaj Meridor, eksa ĉefo de la Juda Sohhnut kaj ambasadoro en Usono (kiu rakontis, ke la onklo de lia patro estis fama esperantisto, Emanuel Olsvanger, kiu en la 20aj fondis la E-movadon en Jerusalemo). Pluraj aĉetis la E-hebrean vortaron de Murjhan, kaj aliajn varojn. ELI ricevis oferton de eldonejo Minerva ke ili lukse reeldonos la vortarojn de Murjhan, E-hebrea kaj Hebrea-E kaj ofertos en ilia vendejo E-librojn.

Amri Wandel, Prezidanto de ELI

*(Pere de Seán Ó Riain. 26/02/2011)*

## Virtuala universitato en ... Esperanto?

En belga tagĵurnalo mi ĵus legis tre interesan raporton de Prof. Vincent Blondel, belga profesoro pri aplikitaj matematikoj, kiu, dum la lerneja jaro 2010-2011, estas "invitita profesoro" de Harvard kaj Massachusetts Institute of Technology (MIT). Li raportas i.a. pri iniciato de Prof. Strang (MIT) kiu, dum la lastaj dek jaroj, instruis matematikon al pli ol 2 milionoj da gestudentoj !!!

Fakte temas pri kursoj, kiuj estas enretigitaj, kaj kiujn studentoj el la tuta mondo povas konsulti kaj studi.

Ĉu ne eblus imagi tian "virtualan universitaton" kun plej diversaj kursaroj en Esperanto? Tio povus ja sproni intereson ĉe E-studentoj, kiuj tiel trovus okazon utile uzi tiun lingvon por fakaj celoj, kaj povus esti gravega komplemento de "universitataj sesioj" organizataj de AIS au kadre de UK.

*(Germain Pirlot. 28/02/2011)*

## KOMPUTEKO - prikomputila terminokolekto.

Mi atentigas vin pri ĉi tiu prikomputila vortaro/terminokolekto, angla-esperanta: http://www.komputeko.net/Libreto/Komputeko%2008032008.pdf

Ofte la parolanto de Esperanto havas dubojn pri la ĝusta/dezirinda prikomputila E-termino, ĉi tiu vortaro/terminkolekto povas helpi. Mi ne celas, ke ghi estu perfekta verko (kiu homa kreaĵo estas perfekta?), sed ĝi estas utila referenca verko.

*(Francisco Javier Moleón. 01/03/2011)*

Mi profitas por atentigi pri "Komputada Leksikono" de Sergio Pokrovskij:
http://bertilow.com/div/komputada_leksikono/index.html

La fasono estas iom eksmoda, sed la enhavo estas brilega, plena je trafaj atentigoj. Ĝi estas la reta versio de fama libro samtitola kaj samaŭtora. Ial, Sergio ne povis daŭrigi eĉ gasti la projekton, kaj Bertilo Wennergren proponis sian retejon por ke tiu laboro ne vaporiĝu.

Mi iam kontaktis la responsulon de "komputeko.net" kaj demandis kial li iniciatas projekton kies neston okupas la KL de SP (tion mi pensis tiam). Li respondis ke la projekto "komputeko.net" estas sufiĉe malsama: nome, kompili terminojn rilatajn al komputiloj en pluraj lingvoj, dum KL estas tradicia unulingva difina vortaro, kun apogo sur la angla lingvo kiel ekstera referenco. Fakte, "Komputeko" uzas KL, ReVo kaj aliajn fontojn por la priskriba parto de la terminaro.

*(Manuel Pancorbo Castro. 01/03/2011)*

## Inaŭguro de la Katedro Esperanto en la univ. de la Plata, Argentino.

Plezure ni anoncas ke oni sukcesis kreadi esperantan katedron en la Universitato de La Plata (Bonaero- Argentino). La inaŭguro de la Katedro "Esperanto kaj sia kulturo" okazos vendrede, la 18-an de marto, en la salonoj de la Rektorejo, strato 7-a inter 47-48-aj je 18,30 horo. Ni invitas vin partopreni aŭ sendi salutmesaĝojn al adreso de organizintoj:
Edgardo Chacon edgardomuseo@yahoo.com.ar
kaj Javier Valli. izatasun@gmail.com

*(Silvia Rottenberg, Prezid.de AEL Argentina E-Ligo http://www.esperanto.org.ar (16/03/2011))*

## Membro-evoluo de UEA.

Estis 5288 individuaj membroj en 2010. En 2009 ili estis 5713. Okazis do malkresko de 425 membroj. UEA ankaŭ registris novan malrekordon de la nombro de individuaj membroj post la dua mondmilito; la antaŭa estis 5702 en

2008. La falo ja estis antaŭvidebla pro la malgrandeco de UK en Havano, kiu tamen klarigas ĝin nur parte.

La evoluo plu estas same negativa ankaŭ ĉi-jare. Kvankam ĉi-jare UK estos pli granda ol pasintjare, la 31-an de marto estis malpli da individuaj membroj ol fine de marto pasintjare: 4297 nun kaj 4463 antaŭ unu jaro (minuso de 166). Verŝhajne la jarfina nombro superos 5000, sed ne estas certe, ĉu ĝi superos 5100.

Jen la nombroj de unuopaj kategorioj fine de marto (parenteze marto 2010): Membro kun Gvidlibro 233 (251), Membro kun Jarlibro 1095 (958), Juna MJ 133 (118), Membro-Abonanto 1831 (2091), Juna MA 50 (88), Dumviva Membro 795 (794), Juna DM 15 (19), Dumviva Membro kun Jarlibro 76 (73), Juna DMJ 9 (9), Honora Membro 53 (55), Honora Patrono 7 (7).

Ĉefe dank' al la pli granda UK en Kopenhago la nombro de MJ kreskis per 152, sed aliflanke tiu de MA falis 298. Pri tiu malkresko parte "kulpas" Fondaĵo Canuto, kiu pro manko de mono remembrigis 52 pasintjarajn MA-membrojn ĉi-jare kiel MJ. Krome, aliaj 56 MA, kiuj mem pagis sian kotizon, ĉi-jare pagis kiel MJ. Parto el ili eble preferas legi la revuon rete; aliaj malkontentas pri ĝi, mankis al ili mono aŭ estis alia kialo. Se ni ne enkalkulas tiujn 108 MA, kiuj nun estas MJ, la falo de MA estas 190, t.e. preskaŭ dekono de la pasintjara nombro. Aldone, samproporcie falis ankaŭ la nombro de simplaj abonoj (sen membreco), nome de 99 al 90.

La falo de MA-membroj estas konstanta: pasintjare ghi estis 244. Laŭ mi estas evidente, ke malkontento pri la nuna redakta koncepto de "Esperanto" negative influas la membroevoluon. Ĝi ne estas la sola faktoro, sed certe grava. Iuj faktoroj estas ekster nia povo kaj ni ne povas influi ilin per niaj decidoj. Iujn aliajn ni ja povas influi kaj tion ni ankaŭ klopodu fari. La revuo de UEA apartenas al ili kaj ni devas kuraĝe alfronti la defion fari la necesajn decidojn kaj agojn por provi turni la nombron de ĝiaj ricevantoj al kresko.

*(Osmo Buller, Ĝenera Sekretario de UEA. 01/04/2011)*

## NE FORGESU!

La sabaton 21-an de majo ni tagmanĝos en restoracio por festi la datrevenon de nia Grupo. Ni atendas vin ĉiujn, kun viaj amikoj kaj familianoj.

